

3/2018

Majo
Junio

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Postkongresa rimarko
- ★ Aŭrorurbo - Ĉu taŭga loko por Esperanto?
- ★ Naŭ monatoj eksterlande por nederlanda e-isto

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

Kunlaboro

T. Nemere, M. Tataro,
A. Wilkus,

ABONOJ

La abono por 2018 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 25 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post aldono de 5 euroj por la bankaj kostoj.
Polan Esperantiston eblas aboni per Konto de PEA en UEA: peaa-v;
Detaloj troviĝas ĉe:
http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Estraro de PEA

Aleksander Zdechlik - prezidanto
Teruo Matsumoto - vicprezidanto
Robert Kamiński - sekretario
Alina Mozer - kasisto
Agnieszka Mozer - estrarano
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendas.

La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.
Represo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Irek Bobrzak ĉefredaktoro de Esperanto-retradio
Varsovia Vento Elsendoj www.podkasto.net

Enhavo

Redaktoraj vortoj	2
Eventoj	
<i>Ilona Koutny</i> , Vintra interlingvistika sesio en Poznań	3
<i>Irena Tomaszewska</i> , Kvina Esperanta Printempo en Szczecin	4
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , La 3-a Interkultura Majrendevuo – Wrocław kaj Góra	6
<i>Svetlana Pogorelaja</i> , Ĉarmujo	7
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , Jam sesan fojon en Wrocław oni kantis en Esperanto	8
<i>Elżbieta Oleśnicka</i> , <i>Henryk Stepień</i> , La kantfestivalo per miaj okuloj	10
<i>Gizela Sklorz</i> , Sukcesaj Esperantaj Tagoj	11
<i>Anna Laskowska</i> , Esperanto – lingvo de amikeco	13
<i>Adam Wilkus</i> , Jubilea renkonto sur Granda Ĉantorio	14
<i>Johano Pachter</i> , Pola Instituto en Berlino memoras pri Esperanto	15
Mojose	
<i>Paweł Wójtowicz</i> , Sabato kun Esperanto en Krakovo -	16
<i>Romualda Jeziorowska</i> , PEJ-membroj denove gvidos kurson por komencantoj dum SLOT-Festivalo!	17
Raportoj, rakontoj	
<i>Hori Jasuo</i> , Pinta konferenco inter Trump kaj Kim	18
<i>Marc Konijnenberg</i> , Naŭ monatoj eksterlande por nederlanda esperantisto	19
<i>Elżbieta Karczewska</i> , Kanti ĉiu povas.....	22
Pri kio ni aŭdas	
<i>Jean Marc LECLERCQ</i> , La lingva eldonejo Assimil	24
<i>Dimitrije Janičić</i> , La produktado de lingvoj	26
<i>Aleksandra Piaścik</i> , Naturaj tonikoj	27
Vizitindaj lokoj	
<i>Ewa Grochowska</i> , Aŭrorurbo - Ĉu taŭga loko por Esperanto?	28
Homoj	
<i>Anna Laskowska</i> , Pri Czesław Biedulski	32
Lingvosciencia angulo	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , “La” – bazaj reguloj – parto 3	33
Literaturaĵoj	
<i>Teresa Nemere</i> , Gaja junia nokto	35
Saĝulaj pensoj	
<i>Andreo Bach</i> , Letero al vi	37
Leterkesto	
<i>Irek Bobrzak</i> , Postkongresa rimarko	38
<i>Elżbieta Karczewska</i> , Literatura Konkurso „Valoras lerni Esperanton, ĉar...”	40
<i>Johano Pachter</i> , Venu al Luminesk' 2018	40
Kalendaro	41
Oni eldonis	
<i>Robert Kamiński</i> , Represo de “Sinjoro Tadeo”	42
Nia fotogalerio	43

Redaktoraj vortoj

Estimataj legantoj

Kun iom da malfruiĝo, ni sukcesis redakti kaj eldoni la trian ĉi-jaran numeron de Pola Esperantisto. Kio nova en ĝia enhavo?

Ekaperis du novaj aŭtoroj, kiuj promesis kontribui al nia redakcia laboro. Legu artikolojn de nia franca amiko JoMo el Tuluzo kaj la leteron de Irek Bobrzak el Varsovio. Rimarkoj de Irek kongruas kun miaj opinioj pri formo de Pola Esperanto-Kongreso. Mi skribis pri tio en la dua numero de PE.

Ni ankaŭ rekomendas interesan artikolon de Ewa Grochocka pri iom utopia, tamen tre interesa ideo de idealisma urba-komunumo „Aŭrorurbo”. Kion vi opinias, ĉu simile idealisma ideo de nia internacia lingvo povos havi en ĝi sian lokon?

En nia revuo en lastaj numeroj aperis nova interesa temo – lingvoj. Mi esperas, ke legantoj de nia revuo varme akceptos ĝin. Ni ĉiuj, uzante la planlingvon, ofte interesiĝas pri aliaj lingvoj. Okazas, ke lingvoj, kiuj malaperas, foje fariĝas politikaj iloj kaj ĝia nombro povas neatendite kreski.

Ĉi-foje, en la ĉapitro “Literaturaĵoj”, ni rememorigas al vi praslavan feston, nun ofte nomatan “*Sankta Johana nokto*”, kiu plue estas gaje festata en la tuta Pollando.



En la ĉapitro “Eventoj” troviĝas kelkaj, laŭ mi interesaj, raportoj pri Esperantaj aranĝoj, kiuj okazis en nia lando antaŭ la someraj ferioj. Ĉu vi sciis pri ili?

Mi kore invitas al la legado.

Robert Kamiński

Andrzej Sochacki ĉe sia fotoekspozicio dum Esperantaj Tagoj de Krakovo

Eventoj

Ilona Koutny

Vintra interlingvistika sesio en Poznań

La 7-a grupo de la Interlingvistikaj Studoj en la universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań, daŭrigis sian laboron dum la vintra sesio la 3-10-an de februaro. Alvenis 14 gestudentoj el dek landoj (Ĉinio, Koreio, Brazilo, Usono, Turkio, Ruslando, Francio, Hispanio, Germanio kaj Pollando) kaj pruvis, ke pere de Esperanto tre bone progresas interkultura komunikado. Post la konsultiĝo kaj ekzamenoj, lunde komenciĝis la kursoj de la dua semestro: Michael Farris prezentis ĝeneralajn regulojn de morfologio kaj sintakso, eluzante la sciojn de la diverslingva partoprenantaro. Lidia Ligęza kaj Tomasz Chmielik enkondukis la studentojn en la duan periodon de la Esperanta literaturo.



La multkultura konsisto de la grupo donis fekundan bazon al Ilona Koutny, por trakti diversajn flankojn de komunikado. La studentoj praktike povis kompari diversajn komunikutimojn kaj korpolingvaĵojn, prezenti siajn kaj deĉifri la aliajn, malkovri, kio estas komuna kaj kio estas malsama. Ŝi gvidis kurson ankaŭ pri Esperanta gramatiko, prezentante la periodojn de nia lingvo kun bazaj dokumentoj. La interesiĝemaj studentoj povis ekkoni kaj diskuti la problemojn de Esperanta morfologio, inkludanta la faman radikkarakteron.

La varma etoso montriĝis ankaŭ dum la komuna vespero. La sesion sekvis ekskurso al Toruń, kie post urborigardado kaj vizito de *Studio P*, en

la Junulara Kulturdomo (kun esperantlingva filmita spektaklo), Maria Pokrzywnicka prezentis en la Etnografia Muzeo la ĉiutagan vivon en nordaj regionoj de Pollando dum la epoko de Zamenhof, ŝi regaligis la gestudentojn per spickukoj kaj ludigis ilin kadre de la interkultura karnavala renkontiĝo.

Irena Tomaszewska

Kvina Esperanta Printempo en Szczecin

Ekde la 20-a ĝis la 22-a de aprilo 2018, okazis en Szczecin jam kvina printempa aranĝo kiun organizis lokaj esperantistoj. Ĉi-jara ĉeftemo estis: „Szczecin – ruĝbrikaj arkitekturaĵoj”. En nia urbo ili abundas kaj parto de ili apartenas al „Eŭropa vojo de brika gotiko”. En la aranĝo partoprenis pli ol kvardek esperantistoj el Pollando kaj Germanio.

Ni komencis la programon de vizito en la urba Filharmonio, kie ni aŭskultis famajn brandenburgajn koncertojn de Johann Sebastian Bach. La barokstilajn muzikverkojn prezentis grupo de la berlinaj virtuozaĵoj, kiuj specialiĝas je malnova muziko.



Esperantistoj sub magnolio fama ŝĉecina simbolo, kiu por ni ekfloris pli rapide ol ĉiam

Sekvontan tagon, antaŭtagmeze, la tuta grupo vizitadis la plej interesajn ruĝbrikajn konstruaĵojn en la urbo, inter aliaj ĵus renovigitan *Domegon de Polico* kaj interesan komplekson de Vojevodio Oficejo, kiu situas ĉe la famaj *Remparoj de Chrobry*. Posttagmeze, en festsalono de la kunvenejo, komenciĝis artaj kaj kulturaj programeroj. Komence Roman Dobrzyński prelegis pri Ludoviko Zamenhof kaj lia familio. La prelego estis ligita kun prezentado de lia nova libro „Zamenhof en Varsovio”. Poste okazis elpaŝo de la ensemblo „Szczecinianie”, kiu prezentis popolajn kantojn. La grupo estas multgeneracia - la plej junaj membroj de la ensemblo estas kelkjaraj, la plej maljunaj preskaŭ kvindekjaraj. Post koncerto de tiu granda grupo, la partoprenantoj aŭskultis ĉambran koncerton de violona kvarteto. Ĉarmaj junaj lernantinoj de Ŝtata Muziklernejo ricevis grandan aplaŭdon de aŭskultantaro, kaj organizantoj invitis ilin al venontjara aranĝo. Dank’ al unu membrino de nia klubo, kiu okupiĝas pri la ekzercado ‘Tai Chi’, entuziasmoj de tiu ĉi arto prezentis sian talenton. Indas menci, ke la gvidantino de la grupo estas monda ĉampionino kaj kelkaj gekolegoj venkis polajn kaj eŭropajn ĉampionturnirojn. Post kelkaj, tre interesaj, ‘Tai Chi’ prezentoj, oni invitis partoprenantojn al komuna ekzercado.

La programon finis la esperantlingva kantado ĉe gitaroj de gastoj el Wrocław. Vespere, same kiel la antaŭan tagon, ĉiuj gustumis en manĝejo hejmpreparitajn kukojn kaj aliajn manĝaĵojn, fine okazis kafoklaĉoj kaj longa komuna kantado. Lastan tagon volontuloj partoprenis la sanktan meson en Esperanto gvidata de juna pastro-esperantisto.



Roman Dobrzyński post prelego subskribis siajn librojn.

La 3-a Interkultura Majrendevuo – Wrocław kaj Góra

La 3-a Interkultura Majrendevuo okazis la 19-24-an de majo 2018, en Wrocław kaj en Góra. La unuan fojon la ĉefa organizanto, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, decidis iomete variigi la ĝisnunan skemon de la majrendevuo, organizante ĝin en du urboj kaj komencante en Wrocław per la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiun gvidis Małgosia Komarnicka kaj JoMo. Poste, la partoprenantoj de la majrendevuo estis veturigataj al Góra, kie ili ĉeestis en riĉa programo, preparita kune kun la loka Universitato de la Tria Aĝo kaj la Esperanto-Klubo en Góra.

La organizantoj de la 3-a Interkultura Majrendevuo atingis pli ol ili estis planintaj en la starigitaj celoj: vigligi la kunlaboron kun neesperantistaj medioj kaj disvastigi Esperanton. Ili kaŭzis, ke la partoprenantoj, esperantistoj kaj neesperantistoj, jam fariĝis bonegaj ambasadoroj de Esperanto. Baldaŭ komenciĝos fondo de nova E-klubo kaj ekfunkcios E-kurso.

Krom la kantfestivalo, la 3-an Interkulturan Majrendevuon konsistigis ankaŭ AMO, kiun gvidis Stefan MacGill, la 4-a Internacia Simpozio, kiun gvidis Małgosia Komarnicka kaj Regina Kumala, laborsesioj, ekskursoj kaj artaj programoj. Esperantistoj kaj neesperantistoj havis eblon admiri ekspozicion de bildoj de la artistino el Wrocław, Elżbieta Wodała kaj manĝi hejmfaritajn mangaĵojn. Vespere oni amuziĝis, ĝoje kantante kaj dancante kun JoMo kaj bulgaraj kantistoj.

La 3-a Interkultura Majrendevuo finiĝis per Interkultura Koncerto kaj komuna, publika dancado, kun partopreno de la urbestro de Góra kaj lokaj eminentuloj.

Ĉiuj partoprenantoj de la 3-a Interkultura Majrendevuo pasigis



neforgeseblajn momentojn, malstreĉiĝis manlaborante, dancante, kantante kaj babilante, satmanĝis, vizitis belajn lokojn kaj ekkonis la sekreton de kolorigo de la ĉiutaga vivo.

Ĉarmujo

Ĉu vi iam songis, ke vi estas en la plej ĉarma lando? Inter la plej amikemaj personoj?

Mi tion songis preskaŭ ĉiunokte.

Sed en majo mi vere trafis al simila loko -- tio estis la Esperantujo de la 3-a Interkultura Majrendevuo (ĝi okazis apud Wrocław, en Pollando).

Oni ofte demandis min: "Ĉu al vi plaĉis la aranĝo? Ĉu al vi plaĉis Pollando?". Mi respondadis ĉiam jene: "Mi ne povas nomi eĉ ion kio povus malplialtiĝi la ekstreman ĉarmigecon de ambaŭ". Certe, la plej grandan rolon ludis tio ke la aranĝo estis perfekte organizita. Mi diru: ĉiam estis atentataj la partoprenantoj - ke la esperantistoj eksciu-ekvidu pli multe laŭ la E-temoj kaj ankaŭ pri Pollando, ke neesperantistoj pli ĝuste komprenu kiom bona estas la internacia lingvo kaj kiujn eblecojn ĝi donas.

Mi (sola en Ukrainio) instruas Esperanton al grupo de pensiuloj. Mi preferas zorgi ĝuste pri tiuj personoj, kiuj estas en mia lando nesufiĉe estimataj kaj lastatempe estas ege malriĉigitaj (ankaŭ mi). Do mi ĝojas donadi al ili mian bonkorecon kaj helpon. Pro tio por mi estis speciale kortuŝe partopreni en la 3-a Interkultura Majrendevuo, ĉar la organizantino, samideanino Małgosia Komarnicka, aktivigis tie krom diversaĝuloj ankaŭ multe da esperantistoj-pensiuloj el diversaj loĝlokoj de Pollando. Ŝi ankaŭ invitis min al leciono-renkontiĝo kun siaj lernantinoj-pensiulinoj. Tio estas valora por mi. Mi estis ĉarmigita de la junaj maljunulinoj.

Se paroli pri variantoj de organizado de E-aranĝoj, al mi plaĉas tiu kiel en la Interkultura Majrendevuo - kiam mi (kaj ĉiu) estis frumatene renkontita en la stacidomo, estis donita al mi la amika mano kaj dum la tuta periodo mi ne estis lasata sen atento kaj helpemo eĉ por minuto. Gxuste tiel ankaŭ mi faras invitante gastojn por miaj E-aranĝoj.

La programo estis mirinda: gravaj seriozaj spertinterŝanĝaj prelegoj kaj konversacioj pri Esperanto (AMO-seminario de Stefan MacGill kaj prezento de tre interesa, vere alloga kaj zorgeme bonkore kreita nova pola E-lernolibro de Edward Malewicz), la 4-a Internacia Simpozio pri belkolorigo de ĉiutageco, la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, gajoplenaj kantadoj-dancadoj ĉe lignofajro, turismaj vizitoj al la plej interesaj vidindaĵoj de la regiono (i.a. kun tagmanĝo en vera antikva

kastelo), eĉ partopreno en lecionoj pri unikaj manfaraĵoj, amikaj konversacioj). Ni estis unueca amika familio! Dankon al JoMo kaj bulgaraj kantemuloj kiuj grave helpadis per siaj kantoj ke ni sentu nin gefratoj.

La rezulto: ne nur esperantistoj ricevis maksimumon de utilo sed ankaŭ multaj neesperantistoj kiuj vizitis la aranĝon. Tio gravas -- ĉio estis farite ke ne nur al ni estu feliĉe sed ankaŭ al ĉiuj ĉirkaŭuloj.

Grandan dankon pro la ne ensonĝa sed reala Ĉarmujo.

Małgorzata Komarnicka



Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj
Europejski Festiwal Piosenki Esperanciskiej

Jam sesan fojon en Wrocław oni kantis en Esperanto

La 19-an kaj 20-an de majo 2018, en Wrocław, okazis la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, patronata de *Eurokka*, *Juna Amiko* kaj s-ino Mila van der Horst-Kolińska.

Ĉi-jare la festivalon preparis memstare la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, ricevinte partan monsubtenon de la urbo.



En la festivalo partoprenis infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj en du kategorioj: solisto kaj koruso aŭ ensemblo. Ĉiu partoprenanto kantis du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia gepatra aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estis nur la Esperantaj kantoj.

Sabate, la 19-an de majo, okazis konkursa prezentiĝo de la partoprenantoj, kiun lerte gvidis Halina Kuropatnicka-Salamon. La ĵurio – aro de specialistoj: esperantistoj (Małgosia Komarnicka el Pollando kaj Jean-Marc Leclercq el Francio) kaj muzikistoj (Wojciech Ławnikowicz kaj Marek Szpigelman el Pollando) prijuĝis la prezentiĝojn de la partoprenantoj. En la pritakso estis konsiderataj: lingva korekteco, originaleco, inventemo kaj estetikaj valoroj.

Dimanĉe, la 20-an de majo, okazis Koncerto de la Premiitoj, kiun gvidis Małgosia Komarnicka - la iniciatintino de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kaj JoMo - E-kantisto kaj posedanto de Guinness-rekordo. Post mallonga prezento de la festivala regularo, la publiko aŭskultis la premiitajn kantojn, kaj fine de la koncerto JoMo tiel dancige kantis, ke la publiko, ĝuante la belajn kantojn en Esperanto, dancis sur la scenejo kaj apud ĝi.

La premiitoj ricevis diplomojn, pokalojn, belegajn albumojn, memoraĵojn, florojn kaj donacitaj de Halina Kuropatnicka-Salamon volumetojn de poezio; de Stefan MacGill ili ricevis E-lernolibrojn kaj ekzemplerojn de la revuo *Juna Amiko*. Ĉiuj partoprenantoj ricevis diplomon pro la partopreno.



La ĵurio, jam tradicie, aljuĝis ankaŭ premiojn pro akompanado. Krome, estis du novaj premioj: *Grand Prix* kaj *Publik-premio*. La premion *Grand Prix* ricevis Ewa Domańska el Wrocław kaj la *Publik-premion* ricevis la konata koruso „O’kropy“ el Góra. La organizantoj aprezis ankaŭ la penan laboron de la tradukistoj kaj de la ĵurio.

Ni jam nun invitas vin al Wrocław, por ĉeesti en la sekva, 7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu okazos en 2019, ankaŭ en majo.

La kantfestivalo per miaj okuloj tradukitaj opinioj de kelkaj aŭskultantoj

Elżbieta Oleśnicka

Mi estas pliaĝulino kaj, eluzante iom da libera tempo, mi decidis dediĉi ĝin al lernado de la lingvo Esperanto.

Unuafoje mi partoprenis kiel spektanto en Koncerto de la Premiitoj de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Mi deziris kompari mian imagon pri la funkciado de Esperanto kun la realo, kaj ankaŭ ekkompreni la specialan ligan, kiun la esperantistoj sentas dum siaj renkontiĝoj. Mi multe aŭdis de mia instruistino, Małgosia Komarnicka, pri profitoj, kiujn donas kono de Esperanto.

Kun granda admiro mi aŭskultis kantojn en la bela lingvo Esperanto kaj konstatis, ke oni devas vere ami homojn por spontane liberigi tiom multe da pozitiva energio, belo kaj ĝojo, ĉar la preparado de tiu grandioza koncerto postulis gigantan laboron, energion, entuziasmon, fervoron, kaj krome kuraĝon kaj paciencon.

Nuntempe estas malfacile kunigi diversajn sociajn grupojn, estigi bonajn intergeneraciajn rilatojn, stimuli lingvan kaj muzikan interesiĝojn, kaj treege malfacile estas disvastigadi Esperanton. Des pli mi admiras la organizantojn, kaj ankaŭ partoprenantojn, ke ili scipovis krei alternativan programon al la komercaj, kiuj ricevas grandegan monsubtenon.

Mia partopreno en la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj kaŭzis pli fortan deziron lerni Esperanton, kaj ankaŭ vekis mian interesiĝon pri la E-kulturo. Ludoviko Zamenhof pravis kreante Esperanton, kiu vere estas "pontolingvo" inter homoj.

Henryk Stępień

Dimanĉe, la 20-an de majo, mi hazarde fariĝis parto de la publiko dum la Koncerto de la Premiitoj de la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Mi veturigis al ĝi miajn konatojn per mia aŭto, kaj mi intencis reveni hejmen. Tamen mi ne faris tion kaj pasigis esceptajn momentojn kun kantoj en la belega lingvo Esperanto. Ne konante tiun lingvon, mi eĉ rekonis kelkajn vortojn ...

Jam dum la koncerto mi faris al mi demandon, al kiu mi ne scipovas respondi: kial la belega kaj facila lingvo Esperanto ankoraŭ ne fariĝis vere internacia lingvo?

Sukcesaj Esperantaj Tagoj

Krakovaj Esperantaj Tagoj, organizitaj de Krakova Societo Esperanto, okazis jam 31-an fojon. Ĉi-jara aranĝo estis precipe bone preparita kun riĉa programo. La aranĝon partoprenis esperantistoj el kelkaj regionoj de Pollando kaj du eksterlandanoj: el Francio kaj Germanio. Ni havis okazon aŭskulti multajn interesajn prelegojn kaj artajn muzikajn koncertojn. Dum la prelego pri Esperantaj gramatikaĵoj ni povis profundigi nian lingvokonon. Maria Pokrzywnicka prezentis agadon de Etnografia Muzeo en Toruń kaj utiligon de Esperanto dum ĝia populariga laboro.



Prof. Ilona Koutny honorigis nin per sia ĉeesto kaj interesa prelego pri la temo: "Ĉu lingvo povas krei kulturon?". La krakova esperantistino Marketa Wilkus, diplomitino de la Instruista Trejnado ĉe la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznań, prezentis parton de sia diplomlaboraĵo kaj bone amuzigis nin per lingvo-ludoj. Magdalena Tataro prezentis interesan prelegon pri olimpikaj sportoj kaj sportistoj kaj ankaŭ amuzigis nin per tre bone preparita konkurso kun premioj. Magdalena Tataro kun Robert Kamiński partoprenis Italan Esperanto Kongreson kaj prezentis belegan prezentadon pri ĝi, kun multaj fotoj. Robert Kamiński ankaŭ interese prelegis pri Esperanta kongreso en Japanio. Tre interesa estis ankaŭ prelego de Ewa Grochowska - "Aŭrorurbo - ĉu taŭga loko por Esperanto?" Andrzej Sohacki montris al ni multajn fotojn el Junularaj Kongresoj de Esperanto. Adam Wilkus interese prezentis la temon pri ĉehaj spuroj en

Krakovo. Ankaŭ tre interese parolis pri Afriko vojaĝanto Piotr Nosek, li ankaŭ prezentis multajn fotoj. Tomasz Szymula prelegis pri agado de Pola Esperanto Junularo kaj pri Internacia Junulara Kongreso en Afriko (Togolando 2017). Dawid Kubicki – prezentis temon "Kian imagon vi havu pri eksterteranoj". Konata esperantistino Teresa Nemere proksimigis al ni la vivon kaj agadon de la fama esperantisto Antoni Grabowski kaj valoron de lia traduko de "Sinjoro Tadeo"- la fama pola epopeo de Adam Mickiewicz.



Lidia Ligęza priparolis la vivon kaj verkadon de la pola fama poeto - Bolesław Leśmian. Elektitajn versaĵojn de la poeto recitis la aktorino Anna Ramza. Kortuŝa estis prezentado de vivo kaj pentroarto de la fama Krakova pentristo kaj aktive laboranta kiel esperantisto, jam forpasinta Sinjoro Andrzej Kołpanowicz. Prezentadon aranĝis Marcin kaj Michał Kołpanowicz. Joachim Kołpanowicz, profesia pianisto, kun sia fratino Julia Kołpanowicz, profesia violonistino, majstre ludis muzikan koncerton. Ni ankaŭ povis aŭskulti belegan koncerton de la muzika teamo – „E-familio” el Nowy Sącz kaj ni povis ne nur aŭdi ĉarmajn Esperantajn kantojn, sed ankaŭ kanti ilin kune kun la artistoj. Dimanĉe ni ĉeestis esperantlingvan Sanktan Meson en la franciskana klostro en Wieliczka kun la pastro Stanisław Płachta. Poste

ni vizitis konstruaĵon kiu ebligas densigi la salan akvon. Ĉi tie ni bone ripozis kaj spektis freŝan aeron. La lasta programero estis vizitado de la kastelo en Wieliczka. Ni estas tre dankemaj al la organizantoj de la Krakovaj Esperanto Tagoj.



Anna Laskowska

Esperanto – lingvo de amikeco

En Lublin, junio 2018, okazis jam la kvina konkurso, ligita kun Esperanto, por lernantoj de lokaj lernejoj kaj kulturdomoj. Por la konkurso, junaj partoprenantoj projektis novajn poŝtkartojn je la temo: "Esperanto - lingvo de amikeco."

Partoprenantoj konkuris en kvar aĝkategorioj (de 6 ĝis 18 jaroj). La plej bonaj projektoj en ĉiu kategorio, estis presitaj kiel poŝtkartoj kaj, kompreneble, estis aĉeteblaj en poŝtoŝtancoj! La infanoj estis fieraj, ke ili povis sendi sian propran poŝtkarton al siaj proksimumoj kaj amikoj. La konkurso estis aranĝita kun la honora patroneco de la Pola Poŝto, kiu ankaŭ donacis por laŭreatoj interesajn filatelaĵojn. En la Ĉefa Poŝtoŝtanco en Lublin okazis ankaŭ ekspozicio de ĉiuj konkursaj verkoj.



Ekspozicio de E-filatelaĵoj en ĉefa poŝtoŝtanco en Lublin

Jubilea renkonto sur Granda Ĉantorio

Ĉi-jare, la trian dimanĉon de junio, kune kun Markéta, mi vojaĝis al la pinto Ĉantorio en Beskidy montaro, ĉe la pola-ĉeĥa landlimo, kie okazis internacia E-renkonto. Laŭ mia kalkulado, tiu tradicia renkonto okazis jam la 80-an fojon. Ĉi-foje ni unue supreniris al la pinto Malgranda Ĉantorio el Poniwiec, apud Ustroń. Kutime, funkcias tie telfero, sed pro planita ĉi-semajnfine trejnado de montaraj savantoj, ĉi-foje oni ne povis uzi ĝin kaj ni supreniris perpiede. Tio estis avantaĝo por nia sano kaj bonstato, por korpo kaj spirito. Estis belega, sunplena vetero kaj tiu vojo plaĉis al ni. Arbaro kaj herbejoj estis vivplene verdaj. Refreŝigis nin akvo el la montara fonto. El la pinto ni admiris belan vidon, spirante freŝan, montaran aeron. Survoje ni renkontis multajn bele kantantajn birdojn kaj ŝafojn (tiuj ne kantis). Multaj mirteloj kreskis ĉe arbustoj, sur herbejo apud arbaro.



Finfine, ni venis al la ĉeĥa montara gastejo, kie okazis la E-renkonto. Sume venis 20 personoj de ambaŭ flankoj de la landlimo (unu malaperis komence, sed poste retroviĝis). Ni kunportis kelkajn E-gazetojn, inter aliaj

arkivan Polan Esperantiston 5/2015, en kiu aperis teksto pri historio de la renkontoj sur Ĉantorio. Partoprenantoj kun intereso legis tiun artikolon. Pri la historio de la renkontoj eblas ankaŭ aŭskulti elsendon nr-o 102 de Varsovia Vento: <https://www.podkasto.net/2014/07/15/la-102a-elsendo/>

Ĉe la gastejo lastatempe, aperis belaj, faritajn el ligno, skulptaĵoj, prezentantaj kavalirojn, birdojn kaj aliajn bestojn, kiujn ni rigardis kun intereso kaj kelkaj partoprenantoj fotis sin kun ili. Suno estis forta kaj kun plezuro ni trinkis kaj drinkis ĉeĥajn sukon kaj bieron kaj gustumis lokan manĝaĵon. Kelkaj el la alvenintoj partoprenis konkurson pri lingvaj ludoj.

Posttagmeze, revenante al la pola urbeto Ustroń Polana, sur la pinto Granda Ĉantorio, ni preterpasis ĉeĥan vidturon. En la funkcia tie montara butikoj, ni aĉetis loke produktitan bongustan likvoron nomata "Ĉantoryjská Ořechovka", kies botelo estis fermita per la vera, abela vakso. Ĉe la supra telferstacio, ni preterpasis ankoraŭ du aliajn allogaĵojn: vizitindan falkejon kaj somerajn sledojn. Same kiel aliaj turistoj, ni ripozis sunbruniĝante sur kuŝseĝoj. Per la telfero ni veturis trans arbaro al valo. Tio estis mallonga, sed plezurega ekskurso, kiu treege plaĉis al ni. Oni povas rigardi kelkajn fotojn en la retejo:

www.esperanto.zanet.pl/cxantorio/2018/ Ĝis la revido venontfoje sur la pinto!

Johano Pachter el Berlin

Pola Instituto en Berlino memoras pri Esperanto

Kadre de Eŭropa Pintakunveno pri Kultura Heredaĵo – 18-24.06.2018 la 19-an de junio en Instituto de Pola Respubliko en Berlino okazis oficiala publika prelego pri Esperanto kaj ĝia kulturo de Lu (Louis von Wunsch-Rolshoven). Lu estas reprezentanto de la Germana Esperanto-Asocio kaj administra direktoro de retejo *EsperantoLand.org*. En programo de la kunveno estis ankaŭ koncerto de la reggae kaj repo-muzikisto Jonny M., kiu donis koncerton kun siaj kantoj, skribitaj en Esperanto. Post la kultura programo, gastoj gustumis delikatajn polajn kuiritaĵojn.

La evento estas bela ekzemplo de la germana-pola kultura kunlaboro, surbaze de Esperanto kiel pola kulturheredaĵo.

Sabato kun Esperanto en Krakovo

Sabate la 2-an de junio en Krakovo okazis renkontiĝo de junaj esperantistoj. Venis kaj spertaj kaj novaj esperantanoj – por multaj tio estis unu de la unuaj Esperantaj eventoj. La renkontiĝo komenciĝis sabate per pikniko en la Parko de Jordan, kie ni matenmanĝis kaj ekkonparolis. Feliĉe, la vetero estis sunplena kaj, malgraŭ antaŭviditaj ŝtormoj, pluvo neniam kaptis nin dum la evento.

Poste, ni promenis trans la Malnova Urbo kaj tagmanĝis, ni partoprenis en la programo de Krakovaj E-Tagoj: Tomasz Szymula prelegis pri agoj entreprenitaj de PEJ kaj prezentis fotojn de la lastjara Internacia Junulara Kongreso en Togolando. Siavice Dawid Kubicki rakontis pri astrobiologio kaj ekstertera vivo – temo ŝajne malofta, sed tre interesa. Post la prelegoj, ni iris bierumi kaj kugloludi ĝis vespero, post tio ni devis, bedaŭrinde, reveni hejmen. Ni certe atendos la venontajn renkontiĝojn!



PEJ-membroj denove gvidos kurson por komencantoj dum Slot-Festivalo!

Imagu grandegan festivalon, kiu okazas en ĉarma malnova monaĥejo, altiras ok mil kreemajn kaj lernemajn partoprenantojn el kelkaj landoj kaj en diversa aĝo, kiuj mense kaj spirite multe similas al esperantistoj, kvankam ili (ankoraŭ) ne konas la internacian lingvon. Ĝuste tia estas SLOT-Festivalo (Slot Art Festiwal – festivalo de alternativa kulturo), kiu ĉiujare okazas komence de julio en Lubiąż, proksime al Wrocław!

La festivalo similas ankaŭ iom al Woodstock-Festivalo. Ĝia formo: laborateliroj, sportumado, lecionoj, prelegoj kaj diversaj aktivaĵoj, donas al la evento interesan kaj eksterordinaran karakteron. La oficiala programo estas ege bunta, preskaŭ senfina. La partoprenantoj ofte grupiĝas spontane, por komune kanti, muzikumi aŭ babili – la etoso estas tre amika kaj ĝuinda. Inter la partoprenantoj certe ne povas manki PEJ-aktivuloj, agemaj kaj pretaj por instrui Esperanton.

Kurso de Esperanto okazos jam la trian fojon, kadre de tiu ĉi plej granda artfestivalo en Pollando. Ĉi-foje gvidos ĝin Mariusz Hebdzyński el Zielona Góra. Dum la kurso – oni analizis la filozofian vivstilon, nomata *hygge*. En la dana tio signifas agrablan, komfortan kaj amikan etoson, en kiu homoj kapablas ĝoji pro banalaĵoj en la vivo. Laŭ la ideo de la kurso, Esperanto estas hygge inter la naciaj lingvoj, pro sia facila atingeblo kaj egaleco. La lecionoj okazos ĉiutage, je la 11-a dum la tuta festivalo, t.e. de la 10-a ĝis la 14-a de julio.

Por la venonta jaro, PEJ planas signife plivastigi sian agdon dum la festivalo kaj pli videbligi nian Esperantan komunumon tie. Dume, ni kolektas ideojn kaj eventualajn teamanojn. Aliĝu do, se vi interesiĝas pri la afero, kontaktu la respondeculon per retroŝto:

romualda.jeziorowska@pej.pl.

Kaj ĝis revido en Lubiąż!



Pinta konferenco inter Trump kaj Kim Paca etoso ekestis...

La 12-an de junio, en Singapuro, okazis pinta konferenco inter la usona prezidento Donald Trump kaj la nordkorea gvidanto Kim Jong-un. En la lasta jaro ili kritikis unu la alian per maldecaj vortoj, ekzemple Trump nomis Kim-on “malgranda raketviro” kaj Kim nomis Trump-on “maljuna frenezulo”, tamen subite la

situacio ŝanĝiĝis. En februaro Nord-Koreio kaj Sud-Koreio partoprenis kiel unu teamo en la Vintraj Olimpikoj okazintaj en Sud-Koreio, en aprilo okazis la pinta konferenco inter la sud-korea prezidento Moon Jae in kaj Kim Jong un (foto) en Panmunjom, sur la landlimo, kaj fine okazis tiu konferenco inter Usono kaj Nord-Koreio.



Laŭ ĵurnaloj, enhavo de la komuna deklaro inter Trump kaj Kim estas jena:

1. Trump donis garantion pri sekureco al Nord-Koreio, kaj Kim rekonfirmis sian devon, por sennuklea korea duoninsulo.
2. Surbaze de la volo de ambaŭ popoloj por paco kaj prospero, ambaŭ landoj promesis konstrui novan rilaton inter si.
3. Ambaŭ klopodos konstrui longdaŭran pacan reĝimon en la korea duoninsulo.
4. Ambaŭ rekonfirmis « la deklaron de Panmunjom* » inter Nord-Koreio kaj Sud-Koreio.

*Aprila deklaro inter Moon Jae in kaj Kim Jong un.

5. Nord-Koreio klopodos trovi kaj redoni cindron de militkaptitoj kaj malaperintoj dum la Korea Milito.

6. Por plenumi la rezulton de la konferenco, Mike Pompeo, sekretario de Usono, kaj nord-koreaj altranguloj komencu intertraktadon, kiel eble plej frue.



Kiel taksu tiun deklaron? Estas tre bona afero, ke Nord-Koreio kaj Sud-Koreio kaj Nord-Koreio kaj Usono ekhavis bonajn rilatojn. En la lasta jaro mi, ankaŭ multaj japanoj, tre timis eblan militon. Trump minacis Kim per bombadoj kaj Kim same minacis Trump per nukleaj armiloj. Nia ĉefministro Abe estas lojala hundo de Trump kaj ĉiam diris, ke li samopinias kun Trump kaj subtenas lian politikon. Tio signifas, ke kiam okazos milito inter Nord-Koreio kaj Usono, Japanio fariĝos la unua celo de atakoj el Nord-Koreio, ĉar en la suda insulo Okinavo estas granda militbazo de Usono kaj same ĉirkaŭ Tokio. Se okazos tiu milito, Japanio certe pereos. Tial mi tre timis, kaj mi tre malamis la ĉefministron Abe, pro lia tre danĝera sinteno. Li neniam klopodis pacigi ambaŭ landojn, sed ĉiam sekvante Trump-on, insistis «plej grandan premon al Nord-Koreio». Tial amikiĝo de tiuj du landoj estas tre bonvena por japanoj, kaj mi estas tre feliĉa, sed mi ne povas esti optimisma. Internaciaj rilatoj ne estas simplaj, krome, tiuj du gvidantoj ne estas fidindaj. Mi ne povas antaŭvidi, ke ankaŭ en estonteco ili plu agados racie por paco.

Marc Konijnenberg

Naŭ monatoj eksterlande por nederlanda esperantisto

Saluton, mi mallonge prezentos min al vi: Mi estas Marko, nederlandano, kiu komence de 2017 eklernis Esperanton kaj rapide fortege eniris en Esperantujon. En Nederlando mi ekkonis la volontulojn de TEJO kaj UEA kaj mi komencis envii ilian vivon. Mi ankoraŭ ne ĉeestis en multaj esperantistaj renkontiĝoj – kompreneble, mi nur parolis la lingvon ekde kelkaj monatoj, sed, miaopinie, ili neniam daŭris sufiĉe longe kaj mi ĉiam sopiradis al ili, kiam ili finiĝis; kiom bele do estus, se mi povus esti volontulo, kiel tiuj en la Centra Oficejo de UEA, kiuj plentempe esperantumas!

Ironia bonŝanco: mi perdis la laborpostenon en la flughaveno de Amsterdamo. Perdonta nenion, se mi laboros naŭ monatojn por Esperanto antaŭ ol serĉi novan laboron, kaj konsciante, ke oni rajtas nur unufoje en la vivo (ĝis kiam oni ne estas 30-jara) fari EVS volontuladon, mi, estante jam 25 jara, decidis kandidatiĝi.

Preskaŭ ĉiuj nederlandanoj iras al Francio. Iri al pli orienta lando, estus pli interesa. Ĉu al Slovakio por E@I? Ĉu al Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof? En Nederlando ekzistas antaŭjuĝoj kontraŭ poloj, do unuavide la perspektivo iri al Pollando ne estis tiom alloga. Duavide - eble ĝuste tio ĉi estas bona kialo por iri? Post realigo de la projekto, mi povos diskonigi miajn personajn spertojn, mi havos scion, kiu dolorige mankas al multaj nederlandanoj. Ja Esperanto pliproksimigas homojn, ĉu ne?

Korespondante kun Przemysław Wierzbowski, la prezidanto de la Bjalistoka Esperanto-Societo (BES), mi decidis, ke Bjalistoko estus la ĝusta loko por mi. BES volonte akceptis min. Przemek jam havis okazon ekkoni min en Hispanio, dum trejnado de TEJO. Eble tiu unua komune pasigita aranĝo helpis konvinki lin.



En aŭgusto 2017, mi jam havis okazon ekkoni multajn PEJ-anojn, ĉar ni kune partoprenis en IJK, en Togolando. Mi tie ekkonis ankaŭ mian postan instruistino de la pola lingvo, Iwona Kondraciuk, kun kiu mi poste instruis Esperanton.

Unuan fojon mi loĝos eksterlande, kio okazos? Granda aventuro por homo, kiu devenas el la familio, plena de homoj, kiuj havas vojaĝtimon: la timon ne esti komprenota kaj esti ne-komprenoto. Tamen, mi spertis, ke kun helpo de esperantistoj kaj kun lerta uzado de sia eta kono de la pola lingvo, mi, nederlandano, povis

sufiĉe facile travivi iun tempon en Pollando.

En la volontula laboro mi jam frue komencis instruadon en liceoj, en la BES-klubejo, kaj poste ankaŭ en la Zamenhof-centro kie mi ĉiu-merkrede deĵoris en la Esperanto-libraro. Mi prunteprenis E-instrulibrojn, kaj utiligis en la vera vivo, kion mi lernis el la libroj.

Naŭ monatoj tro rapide forflugis. Skribante la jenan artikolon mi havas ankoraŭ nur semajnon (pli malpi) kaj mi vere miras, kien rapide fuĝis tiom da tempo. Mi tre ĝuis miajn taskojn instruante Esperanton kaj la nederlandan, kunorganizante la bjalistokan lingvo-kafejon, deĵorante en la biblioteko, lernante la polan, kaj, kiam eblis, ĉeestante renkontiĝojn. Mi ankaŭ verkis por la literatura E-konkurso, kiu ĉiu-jare okazas en Bjalistoko.

Mi partoprenis PEJ-semajnfino en Varsovio, vizitis esperantistojn en Vilno, kiam oni festis la centjariĝon de la Litovia sendependeco, kaj, kompreneble, mi ĉeestis en multaj lokaj renkontiĝoj de BES.

Dum la lastaj semajnoj en Pollando, mi deĵoris kun esperantistoj propagante Esperanton dum la turisma foiro en Lodzo kaj mi partoprenis en JES.

Nederlando, kompreneble, ege mankas al mi, sed mi konscias, ke tre baldaŭ mankos al mi Pollando. Neniu meza vojo ekzistas. Mi ja sciis antaŭe, ke mi devos reveni. Do, se vi iam spertis „postkongresan sindromon”, vi povas imagi, kion mi sentas, kiam post naŭ monatoj, dum kiuj mi vivis kun elstaraj esperantistoj kaj neesperantistoj, mi scias, ke neniam plu povos esti tiel, kiel estis.

Mi ne rimarkis, kiam Pollando enradikiĝis en mia koro - mirinda sento. Mi elkore volas rekomendi al junaj legantoj de Pola Esperantisto ke ili konsideru partopreni similan projekton (eble por TEJO/UEA en Roterdamo) ĉar tio estas unika eblo kaj indas ne maltrafi ĝin.

Mi kun bonaj sentoj memoros Pollandon kaj multajn homojn, kiujn mi ekkonis ĉi tie. Dankon al ĉiuj, kiuj plibeligis kaj pliriĉigis mian vivon dum ĉi tiu mirinda periodo!

Elżbieta Karczewska

Kanti ĉiu povas...

Estas varma sabato, la 16-an de majo 2018, en Bjalistoko. Ni sidas sub la somera ombrelo en la ĝardeno de la kafejo “Esperanto” kaj aŭskultas la koncerton de la infana muzikbando *Uku-donaco Bjalistoko*. Uku – signifas komenco de la vorto ukulelo: muzikinstrumento, sur kiu ludas parto de la bando. En miaj rememoroj mi revenas al la komenco de nia konateco.

Antaŭ jaroj, okazis la unua komuna aranĝo de lokaj esperantistoj kaj Lech Mazurek kun lia muzikensemblo *Young Folk Crew*. Ili koncertis ĉefe en

la podlaĥia regiono, sed, danke al Esperanto, malfermiĝis por ili fenestro en la mondon.



Decembre 2012, la urbestro de la itala urbeto Mazara del Vallo sur Sicilio subskribis kun la urbestro de Bjalistoko interkonsenton pri kunlaboro, surbaze de la universala lingvo Esperanto. Sekve, la urbestro el Sicilio invitis nian muzikan grupeton viziti lian urbon maje 2013 kaj koncerti esperantlingve, dum la renkontiĝo de infanoj el Germanio, Italio kaj Hungario, kiuj venos kadre de la projekto Grundvig. Speciale tiucele niaj muzikistoj prilaboris la kanton „Grava”.

Pasis jam 5 jaroj de tiu ĉi ege interesa vizito. Intertempe junularo maturiĝis, koncertis kaj disvastiĝis en la mondo. Iliaj kontaktoj kun la Esperanta mondo estis daŭre viglaj. En la jaro 2014 esperantistoj el Bjalistoko kaj la membroj de la muzikensemblo pasis 4 tagojn en Litovio, partoprenante komune la metiejon de la eŭropa unia projekto „Elloke-Tutmondan”.

Krom tio, *Young Folk Crew* partoprenis en la Internacia Muzika Festivalo – „Viva vento 2014” en la litova urbo Visaginas. Tie koncertis ankaŭ esperantistoj el Francio, Italio kaj lokaj muzikgrupoj, kiuj prezentis la folkloron de minoritatoj, loĝantaj en Litovio: rusoj, bjelorusoj, ukrainanoj, litovoj, poloj, judoj... kaj bjalistokanoj aplaudiis iliajn prezentaĵojn.

Young Folk Crew tradicie kantis en la pola, Esperanto kaj hebrea lingvoj. Furoris la kantoj „Dona, Dona” kaj „Grava”, plenumataj kutime de la

dana ensemblo *Esperanto Desperado*. Same amuze sonis „Hava nagila” en Esperanto. La refrenon de la kanto „Paco, paco ...” kunkantis niaj novaj kolegoj – francaj muzikistoj. Ekde la festivalo, ĝi iĝis nia salutkanto, dum la tuta restado en Litovio.

Junularo povis interkompreniĝi en Esperanto, momente en la angla kaj en la rusa lingvoj. La bazajn litovajn vortojn ni ellernis survoje, de nia 10-jara samgrupano Adrian Daniluk, kiu, danke al siaj familiaj radikoj, povis paroli litove kaj bjelorusse, eĉ sen la fremda akcento.

Niaj prezentaĵoj estis fruktodonaj. Adrian bele kantis kaj ludis sur ukulelo. Alte taksis lian talenton nia nova franca kolego kun dredoj sur la kapo - Zhou-Mack Mafuil. Li mem prezentis reggae de Jamajko. Estis agrable admiri komune la pejzaĝon de Litovio, partopreni diversajn metiejojn en Salakas, Zarasai kaj Visaginas. Speciale por ni koncertis la bjelorusa ensemblo „*Svitanka*” kaj kun plezuro ni ekaŭdis, dum la prezentado, ankaŭ la kanton el nia repertuaro „*Na ulicy mokra*”. Ĉiuj partoprenantoj estis ŝokitaj, kiam la membro de nia ensemblo Krzysiek Halicki, aldone, ekkantis unu strofon de la sama kanto en Esperanto:

*Malsekiĝis strato, pluvas ja sen fino,
Venu, venu al Mi kara, Mia ĉarmulino
Ho venu, ho venu, venu
Venu, venu al Mi kara, Mia ĉarmulino*

La publiko kun aplaŭdo atendis daŭrigon en Esperanto.

Ege interesa okazis nia renkontiĝo kun la orgenistino el la katolika preĝejo en Salakas – sinjorino Galina Palagina. Ni aŭskultis ŝian koncerton kaj ŝi permesis al ni ankaŭ provludi orgenon. Łukasz Kisiel kaj Adrian Daniluk sukcesis fari tion kaj ni laŭte aplaŭdis ilian muzikadon.

Por ĉiam restos en nia memoro la vizito en la Atoma Elektrejo, en Ignalina, ĉe la lago Dryŝwiaty. Post la 30-jara laboro, oni decidis likvidi ĝin paŝo post paŝo, dum 10 venontaj jaroj. Forvojaĝis rusaj specialistoj kaj la urbeto, speciale kreita por laboristoj de la elektrejo, senhomiĝis. Restis nur tiuj, kiuj ne havis alternativon.

Ĉirkaŭveturanta Muzika Lernejo de Lech Mazurek ne ĉesis kontaktojn kun Esperanto. La ensemblo *Uku-donaco Bjalistoko*, konsistanta el lernantoj de bazaj lernejoj, estas ornamo de Esperantaj kaj ne nur Esperantaj lokaj aranĝoj. Ili estas videblaj surstrate en Bjalistoko dum la Esperanta „Flash mob”, kiam ili kantante gvidas sub la verda flago pasantojn al la

monumento al Zamenhof, dum kvartalaj festoj kaj en la kafejo Esperanto, kie ili prezentas multkulturecon de la urbo, ktp.

Miaj pensoj revenis al la kafejo Esperanto, kie ĉiuj gastoj ĵus ekstaris, ĉar infanoj ĵus kantas la himnon de esperantistoj „La Espero” en la nova aranĝo de Lech Mazurek. *“Saltu, saltu infanaro jam venis la printemp”* - estis la kanto, per kiu *Uku-donaco Bjalistoko* komencis sian repertuaron. Kelkaj el la junaj muzikistoj jam sukcese partoprenis en diversaj muzikaj konkursoj. Siajn talentojn prezentas junaj kantistoj kaj muzikistoj. Per aplaŭdo ni gratulas al ili kaj iliaj familianoj. Al Lech Mazurek ni gratulas liajn pedagogiajn talentojn kaj deziras, ke ni ankoraŭ longe kunlaboru por la bono de Esperanto.

Pri kio ni aŭdas

Jean Marc LECLERCQ



La lingva eldonejo Assimil

Ni neniam povos ĝissate laŭdi Assimil-on. Ĝi ne estas kutima aŭ normala eldonejo kaj ĝia historio estas ege interesa. Unu sola homo naskis ĝin, unu bretono kiu nomiĝis Alphonse Chérel, kiu estis vera futurvidanto. Li iam deklaris en la revuo *Savoirs* (Scioj) en la jaro 1933: "Mi estas humanisto, kiu certas ke kompreni unu la alian signifas iri al la universala kunvivo.

Tiel la juna Chérel foriris en sia dudeka vivjaro (1902) al Londono kiel privata instruisto de la franca lingvo en burĝa familio. Havante dudek kvar jarojn (1906), li vojaĝis al Berlino. Li tie lernis la germanan. Havante dudek sep jarojn (1909), li loĝis en Moskvo, kie li tutsimple lernis la rusan, sed komenco de la Unua Mondmilito revenigis lin al la origina bretona urbo *Resnn* (en galoa lingvo, *Roazhon* en la bretona, *Rennes* en la franca).

Havante tridek ses jarojn (1918), li foriris al Madrido kaj poste al Milano. Ĉiufoje li lernis la lingvon de la lando. En Parizo, kie li loĝis en 1928, li elpensis kalendaron, kun leciono de la angla lingvo, ĉe ĉiu paĝo. Estis tuj sukceso, kaj la ideo eldoni libron iĝis iom post iom evidenta. Li do eldonis la saman jaron la unuan lernolibron de la angla lingvo, bazita je "intuicia asimilado", kiun la pedagogoj nomas "la rekta metodo", kaj kiu anstataŭigas la penigan lernadon de tekstoj de la klasika literaturo, kiel oni faris tiam. La unua frazo, de la unua leciono, iĝis ege fama: *My tailor is rich (but my*

english is very poor). Mia tajloro estas riĉa (sed mia angla lingvo estas tre malriĉa).

Dum la Dua Mondmilito, Georges Chérel, la frato de Alphonse, direktoro de publikado, devis resti tri monatojn en malliberejo, pro karikaturoj desegnaĵoj en la germana lernolibro, en kiu "mankis respekto al la persono de Adolf Hitler".

Dum la dua parto de la dudeka jarcento, la nombro de instruataj lingvoj neniam ĉesis kreski. La filozofio de Assimil estas klare malfermiĝi al ĉiuj lingvoj. Tiel do aperis la lernolibro de la okcitana lingvo, kune kun tiu de la bretona, de la korsika, de la katalana (male de la franca registrara filozofio, kiu kontraŭas la lingvojn) kaj de Esperanto!

Nuntempe, la retpaĝaro de la eldonejo enhavas blogon, specialigita je lingvoj, kie ili senĉese klarigas, kial oni devas lerni la minoritatajn lingvojn, la signolignon, kaj Esperanton. Assimil senlace agadas favore al la kultura diverseco.



Mi ne povas rezisti la volon, doni al vi la liston de la lingvoj, pri kiuj Assimil eldonas librojn (eble mi forgesis kelkajn): afrikansa, albana, alzaca, angla (de Ameriko, de Aŭstralio, de Britio), antikva greka, araba (alĝeria, maroka,

tuniza, egipta, libana, klasika), armena, arpitana, bretona, bulgara, cigana, ĉeĥa, ĉina, dana, Esperanto, eŭŝka, finna, flandra, franca, friula, germana, greka, ĝenova, hebrea, hieroglifoj, hindia, hispana (de Argentino, de Meksikio, de Kubo), hungara, indonezia, irlanda, islanda, itala, japana, jida, kabila, kantona, kartvela, kataluna, kebeko, kimra, kmera, korea, korsika, kreola (martinika, gvadelupa, haitia, maŭrica, gviana), kroata, laosa, latina, latva, lingala, litova, lorena, luksemburga, malagasa, malta, maoria, marsejla, nederlanda, norvega, novkaledoniaj lingvoj, okcitana (aŭvernja, lengadoka, gaskona, provenca), persa, piemonta, pikarda, pola, portugala (de Brazilio, de Portugalio), rumana, rusa, sanskrito, serba, serbokroata, slovaka, slovena, svahila, sveda, tagaloga, tahitia, taja, tamila, tibeta, turka, ukraina, urdua, valona, vietnama, volofa.

Kaj tio ne estas ĉio. Assimil ĵus eldonis tabulludojn, el kiuj ni povas citi *Famili Linguo*.

La aŭtoro, Henri-Sébastien Ehrard, naskiĝis en 1980 kaj estas pol-francadevena. Post studadoj de Lingvaj Sciencoj kun opcio de signolingvo, li instruis Esperanton en Bretonio.

Estas notinde, ke sufiĉe ofte, la aŭtoroj de Assimilaj libroj estas esperantistoj. Mi mem verkis en la serio *de poŝo* (konversaci-libroj kun gramatiko kaj vortaro) la gaskonan version, kaj Alain Dawson skribis la pikardan version, kiu havis tre grandan sukceson.

Por ludi *Famil Linguo-n*, oni devas respondi kaj prononci diversajn bazajn demandojn en diversaj lingvoj: angla, bulgara, ĉeĥa, dana, finna, franca, germana, greka, hispana, hungara, itala, kroata, nederlanda, pola, portugala, rumana, sveda ... kaj Esperanto! Tiel la ludantoj devas laŭte eldiri: "Saluton! Ĝis revido! Kiel vi nomiĝas? Kiel vi fartas? Kie vi loĝas?" ... ktp. Bona komenco por lerni la internacian lingvon.

Ni povas do ĝoji, ke la grava eldonejo, kiel Assimil, kiu posedas internacian disdonpovon (oni per ĝi povas lerni la japanan en la germana), respektas tiom multe da lingvoj kaj agadas favore al ilia instruado. Pli ol komerca laboro, kiu havas kulturalan valoron.

Dimitrije JANIČIĆ

korespondanto de MONATO en Serbio

La produktado de lingvoj

Kiam oni dum la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento malfondis la ŝtaton Jugoslavio, sur ĝia teritorio fariĝis sep novaj ŝtatoj: Serbio, Kroatio, Slovenio, Makedonio, Bosnio kaj Hercegovino, Montenegro kaj poste, sur la teritorio de Serbio, aparta memproklamita ŝtato, Kosovo.

Slovenio kaj Makedonio havas siajn lingvojn. En Kosovo oni parolas, krom la serba, la albanan lingvon. En aliaj ŝtatoj oficiale estas parolata la serbokroata lingvo, kvankam ĝi en Serbio nomiĝas la serba kaj en Kroatio la kroata. Inter la serba kaj kroata ekzistas diferencoj, aparte en scienca terminologio, tamen serboj kaj kroatoj ne serĉas tradukistojn. Parolante la serbokroatan oni parolas diversajn dialektojn de la sama lingvo. La kroatoj skribas latinlitere, kaj la serboj uzas kaj latinajn kaj cirilajn literojn.

Ĉiu lando kun sia lingvo ...

Nun, la novaj ŝtatoj asertas, ke en ĉiuj ekzistas apartaj lingvoj: en Montenegro nun oni parolas la montenegran lingvon, en Bosnio kaj Hercegovino oni parolas la kroatan, la serban kaj bosnian lingvojn. Montenegranoj aldonis al la serba lingvo du novajn literojn, kiuj ekzistis en iuj lokaj dialektoj, kaj tiel Montenegro havas „sian” lingvon: la montenegran. En la bosnia lingvo (la lingvo de bosniaj islamanoj) oni aldonis multajn turkajn vortojn, kaj oni asertas, ke tio estas aparta bosnia lingvo.

... kaj verkistoj precizigu la sian

La malgranda jugoslavia literaturo dispartiĝis: nun ekzistas montenegraj, bosniaj, serbaj kaj kroataj verkistoj, filmoj, aktoroj ... Politikistoj diras, ke la lingvoj diferencas, sed ordinaraj civitanoj el la kvar landoj interparolas tute libere sen tradukistoj.

Multaj verkistoj klare signis, al kiu literaturo ili apartenas, kun la celo, ke la novaj ŝtatoj, kie ili estas, ne kverelu. Tiel la Nobel-premiito Ivo Andrić diris, ke li apartenas al la serba literaturo, kvankam lia patro estis kroato, kaj Mehmed Meša Selimović skribis, ke li apartenas al la serba literaturo, kvankam li estis bosnia muzulmano. Tamen en Balkanio tio estas normala.

Aleksandra Piaścik
Nieznany Świat 4/2018

Naturaj tonikoj

Por forigi kosmetikaj maskojn kaj lavi vian vizaĝon, estas bone uzi naturajn tonikojn. Krom akvo, ili enhavas inter alie, plantajn ekstraktojn, oleojn kaj vitaminojn. Jen kelkaj receptoj, por mem prepari naturajn tonikojn.

- **Kamomila-cepa toniko** – kuleron da sekigita kamomilo surverŝu per glaso da varma akvo, post kvaronhoro filtru fluaĵon kaj aldonu kuleron da cepo-suko.
- **Riza toniko** - metu malgrandan sakon da rizo en bovlon, surverŝu ĝin per la varma akvo, Miksu ĝin kaj kovru. Post tri horoj, forprenu rizon kaj per restinta akvo lavu vian vizaĝon.
- **Roza toniko** - boligu du glasojn da akvo en kaldrono, poste enŝutu

plenmanon da rozaj petaloj. Boligu kun la malalta varmo dum duonhoro. Poste, apartigu petalojn per kribrilo kaj malvarmigu. Uzu ĝin plurfoje ĉiutage.

- **Herba toniko** - miksigu en egalaj proporcioj salvion, akileon kaj kamomilon. Kuleron da miksaĵo metu al bolanta akvo. Brogu sub kovrilo dum 15 minutoj. Apartigu herbojn per kribrilo kaj per la ricevita solvaĵo lavu vian vizaĝon.
- **Urtika toniko** - 2 kulerojn da sekigita urtiko aldonu al 2 glasoj da bolanta akvo. Post 15 minutoj, apartigu urtikon per kribrilo kaj aldonu kuleron da citronosuko kaj kuleron da forta alkoholo. Per la ricevita solvaĵo lavu vian vizaĝon.


Vizitindaj lokoj

Ewa Grochowska

Aŭrorurbo - Ĉu taŭga loko por Esperanto?

Aŭrorurbo (Auroville) estas loko en Tamulio, suda ŝtato de Barato. Ĝi situas 12 km de Puduĉero (aŭ Pondiĉero)* apud la Golfo de Bengalo (Tamulio estis franca teritorio ĝis la jaro 1954). Mi restadis en la Urbo de Aŭroro dufoje ses semajnojn por pririgardi kaj sperti la ĉiutagan vivon de tiu altspirita, tamen senreligia komunumo, kies 2800 loĝantoj devenas el 50 landoj.

La spiriteco de la komunumo baziĝas sur la instruado de Sri Aurobindo (1872 – 1950), hinda erudito, filozofo, jogano kaj verkisto, kies unua kulturo estis eŭropa. Infano, li estis edukita en Britujo. Bona lernanto, 12-jara li jam regis la francan, grekan, latinan lingvojn kaj iĝis brila studento en Kembriĝo. Dudekjara li revenis en Baraton kaj malkovris la hindan kulturon, eklernis la hindiajn lingvojn, legis la Vedojn. En Kalkuto li iĝis ĉefredaktoro de la ĵurnalo *Bande Mataram* kaj verke batatalis por liberigi Baraton de la angla jugo. False akuzita, li pasigis unu jaron en malliberejo. Post tiu periodo de profunda meditado li forlasis la politikon kaj dediĉis sin al spirita esplorado. Timante la Angloj li rifuĝis en Puduĉero, kie li fondis kun kelkaj disĉiploj la aŝramon.



La ĉefideoj-revoj de Sri Aurobindo estis: liberigo kaj unuigo de Hindio, monda unueco, hinda spiriteco donacota al la mondo, mesaĝo pri nova fazo en la homa evoluado kiu postulas, ke ĉiu homo plialtigu sian konsciencon.

En 1914 alvenis en Puduĉero, la francino Mirra Alfassa Richard (1878 – 1973), kiu post kelkaj jaroj iĝis la spirita kunulino de Sri Aurobindo kaj ekde la jaro 1926, la estrino de la aŝramo. Li nomis ŝin « Patrino » por esprimi sian estimon.

« Patrino », eksterordinara, klera virino, jam en 1954 priskribis sian revon pri loko, pri kiu neniu nacio povus diri, ke « ĝi estas mia propraĵo », en kiu ĉiu honesta homo povus vivi libere esti tie mondcivitano. En tiu loko de paco kaj de harmonio, la homoj baraktus nur por venki siajn proprajn malfortojn, la individua valoro estus pli grava ol la materiala riĉeco. La homoj laborus ne por enspezi monon sed por plej bone uzi siajn kapablecojn. La arta beleco estus alirebla por ĉiuj, senpaga. La infanoj lernus ne por pasigi ekzamenojn sed por disvolvi siajn talentojn. La sola aŭtoritato en tiu loko estus la Supera Vero.

La revo iĝis realo. La 28-an de februaro, sur nuda, ruĝa ebenaĵo, en la ĉeesto de 5000 homoj Patrino legis la ĉarton de « Aŭrorurbo ». Resume : Aŭrorurbo estas propraĵo de la tuta homaro, loko de senfina edukado, de konstanta progreso, de junularo neniam maljuniĝanta, loko de materiaj kaj spiritaĵoj esploroj por doni korpon al la Homa Unueco. Delegitoj el 124 landoj kaj el 23 hindiaj ŝtatoj enmetis iom da tero en marmoran, lotusforman urnon. Tiel fondiĝis Aŭrorurbo. En 1988, la Hindia Parlamento atribuis al la Urbo de Aŭroro laŭleĝan statuton, unikan en la mondo. UNESKO aprobis Aŭrorurbon per kvar rezolucioj.

Aŭrorurbo estas nek sekto, nek kolozo, nek kibuco. Krome la komuna spiriteco kaj kelkaj limigoj difinitaj de la Fondacio (*Fondation Auroville*) ĉiu komerca ĉelo, ĉiu rezidanto, difinas libere siajn celojn kaj respondecas pri siaj vivrimedoj. Aŭrorurbo montras, ke oni povas funkcii sen multaj reguloj sed laŭ propra konscienco. La fondiĝo de Aŭrorurbo bonege spronis la ekonomion de apudaj vilaĝoj. La altkvalita akvo, la elektro estas alireblaj al la kamparanoj.

Pri la kontentiga regado de la komunumo zorgas estraro nomumita de la Hindia Registaro. Ofte la ĉefan rolon ludas laborgrupoj, kies membroj estas elektitaj de la loĝantoj. Oni decidas interkonsente. Ekonomie oni celas memstaron, tamen gravaj projektoj ricevas donacojn kaj financon subtenon de Hindio. Oni celas pagi ne kontante sed per speciala karto-identigilo. Ne ekzistas polico.

Post 50 jaroj Aŭrorurbo fondita en dezerto iĝis verda oazo (Aŭrorurbanoj, helpe de volontuloj kaj de vilaĝanoj plantis 3 milionojn da arboj). Ĝi estas ankaŭ mondkonata ekovilaĝo. Oni uzas ĉi-tie sunan energion (la Suna Kuirejo preparas milon da manĝoj tage), oni havas altkvalitan akvon dank' al la « akvodinamikado », la nutraĵoj devenas el bienoj kaj ĝardenoj en Aŭrorurbo. Venas en la vilaĝon esploristoj el diversaj landoj por prilabori kaj sperti novajn metodojn de kulturado, arkitekturo, edukado. Aŭrorurbo posedas du bibliotekojn (unu kun libroj en sep lingvoj), lingvo-laboratorion, kinejon. La prelegoj, filmoj, koncertoj, spektakloj estas plej ofte senpagaj.



La fondiĝo de Aŭrorurbo bonege spronis la ekonomion de apudaj vilaĝoj. Disvolviĝantaj entreprenoj ekdungis lokajn kamparanojn. Multaj alfabetiĝis kaj enkondukis hejmen bazajn higienregulojn.

En 2008, post 35 jaroj, oni finis la konstruadon de la Matrimandiro (en la tamula lingvo, templo de patrino), laŭ projekto de la franca arkitekto Roger Anger. Ĝi estas la animo de Aŭrorurbo, loko de silenta koncentriĝo sen iu ajn celebrado, sen ritoj, sen preĝoj. Matrimandiro allogas multajn turistojn.

Kaj kio pri la loĝantoj kaj ties lingvoj? En Barato la du oficialaj lingvoj esta la hindia kaj la angla (la anglan parolas kiel unuan aŭ duan lingvon nur 12% da loĝantoj). En Aŭrorurbo, kie loĝas pli ol 1200 Hindoj kaj tiom da

eŭropanoj (plej multaj estas la francoj: 400 homoj), oficialaj estas kvar lingvoj: la angla, la franca, la sanskrita, la tamula. Tamen fakte superas la angla lingvo.

Jam dum mia unua restado en Aŭrorurbo mi miris, ke ĉi-tie, neniu pensis pri Esperanto. Tamen mi eraris. Post longa serĉado, mi trovis en la « Agendo de Patrino » (registrita kaj eldonita de Satprem, franca verkisto, kiu daŭrigis la agadon de Sri Aurobindo kaj Patrino) informon pri Esperantistoj, kiuj en la jaro 1970, skribis al Patrino, proponante Esperanton kiel lingvon de Aŭrorurbo. Ŝi hezitis sed... Ŝi ne lernis la internacian lingvon; krome ŝi jam estis 92-jara kaj okupiĝis pri aliaj aferoj.


Neatendite, la saman respondon al mia titolo-demando, kiun mi intencis doni fine de mia teksto, mi trovis en la artikolo de anonima aŭtoro. En 1989, en la revuo *Ekumenismo*, tiu homo skribis:

« Kiam oni komencos la konstruadon de la Esperanto-Pavilono pri esperantaj kulturo kaj literaturo? Kial oni ne fondos ankaŭ esperantolingvan kolonieton en tiu internacia urbo? Tie pli ol ie ajn, estas evidenta loko por Esperantujo ».

Disvastigi Esperanton en tiu aparta loko estas malfacila sed interesa defio. Kuraĝuloj komencis konstrui Aŭrorurbon en dezerto, do kial Esperantistoj ne povus same fari? Ni provu!

Bona novaĵo: la unua Esperantisto, membro de la Asocio Esperanto-Grenoble, daŭre loĝos en Aŭrorurbo ekde Januaro 2019.

*Temas pri Pondicherry, PIV-a nomo: Pondiĉero sed en 2006 la Hindia Parlamento ŝanĝis la nomojn de multaj urboj; Pondicherry estas Puduchery, en Esperanto: Puduĉero.



Anna Laskowska

Pri Czesław Biedulski

La 15-an de aprilo 2018, mortis la samideano Czesław Henryk Biedulski - pollitova monaĥo, pastro, bioelektronikisto kaj eldonisto, Prezidanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kunfondinto de Esperanto Librejo en la Ĉefa Biblioteko ĉe Katolika Universitato en Lublin.

Czesław Biedulski edukiĝis en Fromborka Malsupra Seminario de Salezianoj kaj studis en Supera Animzorga Seminario en Nysa. En 1956, li aniĝis la kapucenan ordenon en Varsovio. Post novicado kaj filozofi-teologiaj studoj, li pastrigis la en la jaro 1963. Tuj poste, li ekstudis en naturfilozofia sekcio ĉe la Fakultato de Kristana Filozofio en la Katolika Universitato en Lublin. En Lublin li estis ĝis la jaro 1975. Ekde la jaro 1962, li estas aktiva esperantisto. Kune kun la pastro Henryk Paruzel, li fondis la 24-an de oktobro 1974 Esperanto-bibliotekon ĉe la Universitata Biblioteko de KUL. En la jaro 1974, li eniris la estraron de IKUE. Dum lia prezidanteco, komencis labori la unua centra oficejo de IKUE en Romo.



En la jaro 1977, Czesław Biedulski kunorganizis la memorindan 37-an IKUE-kongreson en Częstochowa (700 kongresanoj, el 23 landoj, 4 episkopoj kaj pli ol 40 pastroj). Dum lia prezidanteco en IKUE, revigliĝis la eldona agado kaj komenciĝis la E-elsendoj ĉe Radio Vatikana. En la jaro 1978, li anoncis sian rezignon de la prezidanteco kaj revenis al Varsovio.

Funebra entombigo okazis la 23-an de aprilo 2018, en Lublin, sur la tombejo ĉe la strato Lipowa. La ceremonion partoprenis, inter aliaj, la gvidantino de la librejo de KUL Anna Krasuska, ekslaborantoj de la biblioteko kaj esperantistoj el Lublin.

Pli da informoj pri agado de Czesław Biedulski oni povas legi en Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Czesław_Biedulski (la retpaĝo farita de Krzysztof Śliwiński) kaj retejo de IKUE

<http://www.ikue.org/estraro/prezidantoj.html>



Czesław Biedulski kun Józef Kondor C. Biedulski en 2008 dum konferenco en Lublin

Lingvosciencia angulo

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

La – bazaj reguloj – parto 3

La – konateco

Konateco povas ekesti en diversaj manieroj.

Antaŭe menciita

Normale io estas konata, ĉar oni jam antaŭe menciis ĝin. *La* tiam signifas, ke oni denove mencias ion jam antaŭe priparolitan. Neuzado de *la* signifas, ke oni enkondukas en la rakonton nova(j)n persono(j)n aŭ afero(j)n:

- *Mi havas **grandan domon**. **La domo** havas du etaĝojn.* Ĉe la unua mencio *la* aŭskultanto ankoraŭ ne scias, pri kiu domo temas. Tial *la* parolanto ne uzas *la*. Ĉe la dua mencio *la* parolanto aldonas *la* por montri, ke temas pri la ĵus menciita domo. Se li tiam ne uzus *la*, *la* aŭskultanto devus supozi, ke temas pri alia domo ol la ĵus menciita.

- *En tiu ĉi skatolo estas **frukto**. **La frukto** estas ronda.* Unue *frukto* (sen *la*) enkondukas novan aferon. *La* aŭskultanto do scias, ke ekzistas frukto en la skatolo. Poste *la* parolanto povas daŭrigi paroli pri tiu sama frukto per la vortoj *la frukto*.

- *Mi havas **tri infanojn**. **La infanoj** ofte ĝojigas min.* *La* montras, ke temas denove pri la jam menciitaj infanoj.

- *Sur la strato iris tri viroj. Ili aspektis kiel friponoj. Subite la tri friponoj malaperis en banko. Ŝajnis, ke la banko estas prirabota. Post la unua mencio de la tri viroj, kaj la informo, ke ili aspektas kiel friponoj, oni povas simple nomi ilin la (tri) friponoj. La frazparto la (tri) friponoj servas kiel okaza propra nomo de ĝuste tiuj tri viroj. Post la unua mencio de la banko oni povas nomi ĝin la banko.*

Ne necesas uzi precize la samajn vortojn por povi paroli pri la sama afero kun la:

- *Tre malproksime de ĉi tie [...] loĝis reĝo, kiu havis dek unu filojn kaj unu filinon, Elizon. La dek unu fratoj [...] iradis en la lernejon kun stelo sur la brusto kaj sabro ĉe la flanko. Kvankam oni unue mencias ilin per la vorto filoj, oni povas poste nomi ilin la (dek unu) fratoj. Oni senprobleme komprenas, ke estas la samaj homoj.*

Nerekte menciita, divenebla

Ofte io estas konata, ĉar alia antaŭe menciita afero komprenigas ĝian ekziston, aŭ ĉar la aŭskultanto havas la necesajn sciojn pri la mondo. Ofte oni antaŭsupozas tre detalajn sciojn:

- *Mi aĉetis aŭton, sed la motoro ne funkcias. La motoro mem ne estas rekte menciita antaŭe, nur la aŭto, sed ĉar ĉiu aŭto normale havas motoron, la aŭskultanto povas kompreni, ke temas pri la motoro de la ĵus menciita aŭto. Oni povus ankaŭ diri ĝia motoro, kio estus eĉ pli klara.*

- *Tie vi rimarkos tri pordojn. Vi povas ilin malfermi, la ŝlosilo sidas en ili.* FA1.5 Unue la tri pordoj estas menciitaj. Pordo normale havas seruron, kaj por seruro normale ekzistas ŝlosilo. Oni do komprenas, ke la ŝlosilo estas la speciala ŝlosilo de ĉiu el la jam menciitaj pordoj.

- *Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo. La aŭskultanto scias, ke la parolanto estas homo, kaj ke homo havas buŝon kaj nazon. La buŝo kaj la nazo do egalas al mia buŝo kaj mia nazo. Oni povus eble forlasi la, sed tiam iomete sonus kvazaŭ la parolanto dubus, ke la aŭskultanto scias, ke homo havas buŝon kaj nazon.*

- *Ĉiuj sonoriloj de la preĝeja turo sonorvokis en la preĝejon, la homoj estis orname vestitaj kaj iris kun la kantolibro sub la brako, por aŭskulti la predikon. Antaŭe oni nur informis, ke la aferoj okazas en vilaĝo dimanĉe (temas cetere pri fabela vilaĝo, kiun la leganto do ne povas koni). Oni ne parolis antaŭe pri preĝejo, preĝeja turo, homoj, kantolibroj aŭ prediko. La rakontanto tamen supozas, ke la leganto scias, ke en vilaĝoj troviĝas homoj kaj preĝejo kun turo, kaj ke en dimanĉo la homoj iras al la preĝejo, kie okazas prediko, kaj ke la homoj posedas kantolibrojn. La uzo de la-oj do diras al la leganto kvazaŭ: "Vi ja scias, ke tiaj aferoj kutime okazas en vilaĝoj dimanĉe." Se oni rakontus tion ĉi al homo, kiu eble ne scias ĉion tion, oni ne uzus la.*

Teresa Nemere

Gaja junia nokto

Laŭ la malnova kutimo, atinganta eĉ praslavan tempon, la plej mallonga nokto, la 23/24-an de junio, nun ofte nomata "*Sankta Johana nokto*", estis kaj plue estas gaje festata en la tuta Pollando. Tradicie apud riveroj, ankaŭ sur montoj, oni bruligis fajrojn, ĉe kiuj gejunuloj dancis, kantis pri sia amo, revoj kaj sopiroj. Knaboj saltis super fajro, prezentante sian lertecon, ĉe akvoj ili kaptis florkronojn, ofte ornamitaj per kandeloj, kiujn ĵetadis knabinoj, volante ekkoni siajn amantojn. Kuraĝaj knabinoj serĉis en arbaro filikflorojn, kiuj certigas feliĉon. Tiamaniere ili aŭguris, provis diveni sian sorton. Kvankam nun, ŝajne, jam neniu serioze kredas je aŭguroj, la kutimo gaje pasigi tiun nokton daŭras en multaj lokoj kaj nun, ankaŭ en urboj, oni festas, aranĝas tre diversajn amuzeblecojn.

Multaj literaturaĵoj priskribas kutimojn, kunligitaj kun la festa nokto. Tiutemaj motivoj ekaperis ankaŭ en la versaĵoj, senditaj por la pasintjara poezia konkurso "*Ĉe la rivero Vistulo*". Ni prezentas 2 el inter ili:

Ewa Grochowska el Francio

Festo ĉe Vistulo

*Ni dancu borde de Vistulo!
Ĉiujn zorgojn ni forgesu!
Same, kiel niaj prauloj
Ni sanktan Johanon festu!
Amasigu branĉojn junuloj!
Altajn fajrojn ni bruligos.
Certe ĝojegos la sanktulo,
Kiam super varmaj flamoj
Saltos fervoraj kuraĝuloj.
Virinoj plektu florkronojn!*

*Vi ĵetos ilin al Vistulo
Kun ekbrulintaj kandeloj.
Magia nokto por soluloj:
Eblas trovi amantinon!
Laŭte kantu, frenezuloj,
De juneco ebriaj,
Pri nia rivero Vistulo!*

Urszula Tupajka el Pollando

Laŭ la melodio de la malnova popola kanto "Płynie Wisła płynie"

River fluanta

*Fluas Vistul' blua /kvazaŭ akvrubando/ - bis
Ĉar devas brakumi la tutan Pollandon/ - bis
Ringe sieĝas urbojn/ kampojn kaj vilaĝojn/ - bis
Memorindaj ĉiam, gardas travivaĵojn/ - bis*

*Akvnivelon povas/ ĝi levi danĝere/ - bis
Kaj al trog' humile, reveni senpere/ - bis
Virgulinoj ĵetas/laŭ instig' Amora/ - bis
Florkronojn en fluon, laŭ kutim' popola/ - bis*

*Vistul', kara Vistul'/ kien vi nun fluas/- bis
De kie vi ĉerpas, vian akvon puran?/- bis
En ĉi kant' eterne,/ĉiuj vin demandas/ - bis
Muĝas vi, susuras, sed respondo mankas./ - bis*



Andreo Bach

Letero al vi

Mi ne scias, kiu vi estas kaj kiel vi nomiĝas, mia amiko, kiu loĝas en alia lando kaj kiu parolas en alia nacia lingvo, kvankam certe vi klopodas paroli Esperanton same kiel mi. Esperanto estas bona ideo, pri tio mi havas neniujn dubojn. Sed restas la demando, kion mi kaj vi atingos danke al tiu ĉi lerta inventaĵo de Zamenhof. Ĉu Esperanto faros en ni iujn ŝanĝojn direkte al la plibonigo de nia komuna mondo? Sed, kian mondon mi kaj vi deziras? Certe feliĉan! Sed, kion por vi kaj por mi signifas esti feliĉa homo? Mi, ekzemple, estas feliĉa, kiam ĉio iras bone en mia vivo, kiam mankas grandaj problemoj kaj tro grandaj ĉagreniĝoj, por elteni ilin.



Sed, kiam, eventuale, tia bona periodo sekvas post iu malpli bonŝanca tempo, tiam estante persono feliĉa, mi komencas pensi pri aliaj homoj, pri tio, ĉu ili ankaŭ nun estas feliĉaj, aŭ ĉu ili havas ŝancon esti tiaj? Kelkan feliĉon donas al la homo la materia bonsato, do ĉiu loĝanto de nia planedo devus posedi iun minimuman eblecon vivi. Sed, kiel difini ĉi minimumon? Laŭ mi, tiu minimumo signifas, ke la homo povas vivteni sin laborante 8 horojn tage kaj la ceteron de sia tempo povas dividi kun sia familio, proksimuloj, amikoj, iom ripozi, dediĉi tempon por sia pasio aŭ hobbio, fizika sano k.t.p. Alikaze, kiam oni devas labori pli, por, ekzemple, repagi kreditojn aŭ prilabori monon, por povi sufiĉe multe manĝi mem kaj manĝigi sian familion, tiam ni komencas paroli pri malfeliĉo, pri la formo de sklaveco.

Do, ne temas, laŭ mi, nur pri tio ke mi mem estu feliĉa, sed temas ankaŭ pri tio, ĉu ĝenerale eblas esti feliĉa en la hodiaŭa tempo kaj, sekve, kiel feliĉigi aliajn? Kompreneble, preskaŭ neniu havas la eblecon plibonigi la materian staton de aliaj homoj. Kelkfoje ni povas helpi iugrade, sed tia eblo estas ege limigita. Pli facile estas psike apogi alian homon, doni al iu iun konsilon, averti pri danĝero k.t.p.

Ni ĉiuj devas ĝoji, kiam ĉio iras glate, ni devas esperi, ke la estonteco alportos novajn pozitivajn ŝanĝojn kaj ke en ni estas multe da bono. Tamen, ni devas ĉiam eĉ iomete pensi pri niaj gefratoj, t.e. aliaj homoj, kies situacio estas malpli bona. Ĉiam ekzistos homoj, kiuj bezonos nian helpon, eĉ se temas nur pri nia zorga penso, pri nia deziro, ke ajna malbono ŝanĝiĝu je bono.

Se mi hodiaŭ ĝojas, ke mi ellernis Esperanton, mi ĝojas pro tio, ke mi apartenas al la granda homa familio, kiu uzas unu komunan lingvon, kiu havas similajn esperojn kaj strebojn, kiu estas tiel riĉa, kiel riĉaj estas la kulturoj kaj spertoj de unuopaj nacioj. Malgraŭ ĉiuj niaj diferencoj, ni konsistigas iun specialan komunumon de proksimuloj, kiuj povas facile interŝanĝi inter si multajn informojn, sen tiu negativa bagaĝo, kiun havas hodiaŭ ofte amaskomunikiloj, kiuj devas plaĉi al finance fortaj grupoj de reklamabonantoj, kiuj mondscale influas la vivon de ĉiu el ni.

Anstataŭ tio, inter ni povas traflui libere ajna informado kaj ajna pensmaniero. Mi estas certa, ke ĝuste esperantisto, kaj nur esperantisto estas homo vere malfermita kaj tolerema. Mi esperas, ke danke al modernaj rimedoj pri facila komunikado, esperantistoj kreas jam nun novan platformon de interkompreniĝo, kiun bonŝance influas neniu deekstere. Tiu ĉi platformo ĉiam pli disvolviĝas tra la mondo, forme de plej diversaj radioj, televido kaj aliaj forumoj. Limigas nin nur nivelo de nia lingvokono kaj bonvolo partopreni tiun ĉi novan movadon.

Leterkesto



Irek Bobrzak,

Postkongresa rimarko

Nek plendi, nek kritiki mi deziras. Ankaŭ nenion malbonan mi intencas diri pri la organizanto, kiu multe klopodis, por ke ĉiuj estu kontentaj, pri la partoprenantoj, kiuj, pro alveno de multaj eksterlandanoj, kreis interesan, internacian kaj bonan etoson. Verdire mi deziras nur rimarki, ĉar post alveno al Zabrze-urbo, simple mi perdis orientiĝon. Mi supozis, ke venas mi al la 37-a Kongreso de Polaj Esperantistoj, tamen, dume evidentiĝis, eĉ tuj, ĉar mi ricevis la programon, ke ne pri kongreso temas, sed pri distra kaj turisma renkontiĝo, evento, kunveno de samideanoj aŭ io tia. Por ke estu pli facile kompreni mian dilemon, malfermu ni la vortaron Plenan kaj Ilustritan.

*kongres/o

1 Solena kunveno de samcelanoj aŭ samprofesianoj, el unu aŭ el diversaj landoj, por diskuti komunajn literaturajn, sciencajn, politikajn, ekonomikajn demandojn: kongreso de medicinistoj, de lingvistoj; kongreso de E.Z; universala, nacia, internacia kongresoZ; la Bulonja, Ĝeneva kongresoZ; ĉe niaj kongresojZ; en la kongresoZ.

2 🏛️ Iama nomo de diplomaciaj konferencoj: la Kongreso de VienoZ (1815), de Parizo (1856).

3 Σ Nomo de iuj leĝodonaj asembleoj (federacia asembleo en Usono, komuna kunveno de ambaŭ asembleoj en Francio).

Nun, ŝajne, klariĝas senco de la rimarko. Ĉar fakte, nenion el la difino vortara mi trovis dume, krom la enkonduka parto: Solena kunveno de samcelanoj. Jes, solene kaj samcele estis dum la malfermo, eĉ impone, ĉar okazis ĝi en eleganta karbo-mineja salono, profunde sub la tero, kie aperis la lokaj aŭtoritatoj, sekvis paroladoj, “preslejumis” eĉ JoMo. Kaj ĉio.



Ekskurso laŭ interesaj, minejaj koridoroj, tagmanĝo, unu prelego – tre bona, sed tamen nek pri la pola movado esperantista nek pri Esperanto, teknika paŭzo, koncerto. Ne diras mi, ke mi enuiĝis. Tute ne. Neniam pli frue mi estis en karbominejo, ankaŭ kompanio de geamikoj estis gaja kaj distra. Sed kial ni nomu ĉi-specan eventon kongreso? Ĉu ne sufiĉus renkontiĝo, kunveno, Esperanto-tagoj de...? Bedaŭrinde, mia rimarko ne koncernas nur la polan movadon. Similan tendencon pri la landaj kongresoj mi spertis ankaŭ eksterlande - turisme, distre kaj geamike.

Kiu eraras - ĉu PIV aŭ ni? Ni, (kaj speciale en Pollando, kiel la rektaj postuloj de la bela kaj nobla ideo, de flama kaj fervora agado de Zamenhof, Grabowski, Belmont kaj multaj multaj aliaj dank' al kiuj Esperanto daŭre ekzistas), havas riĉan E-kulturon, kiu estas moderna, trafa kaj praktika. Kien ni iras? En ordo - turismumu ni, amikumumu, pasu distre la tempon, kial ne? Sed, kongreso restu kongreso! Tiun gravan eventon, kiu havas potencon kolekti pli multajn ol kutime, uzu ni laŭ PIV-difino por diskuti, plani, serĉi eblojn kunlabori, helpi al la movado, al Esperanto. Ĉu? Tiel ni flankiĝis, ke jam ni ne kapablas? Bona demando. Kaj kun tiu mia dilemo mi lasas vin ĝis la 38-a Kongreso de Polaj Esperantistoj.




Elżbieta Karczewska,

Literatura Konkurso „Valoras lerni Esperanton, ĉar...”

Podlaĥia Libraro kaj Bjalistoka E-Societo anoncis novan literaturan konkurson. B.v. legi atente la regularon, skribi la verkon kaj sendi ĝin ĝustatempe al Bjalistoko. Se vi havos problemon kun la registro de via verko sur la CD-isko vi povos sendi ĝin rete. Tamen la aliĝilo plenigita kaj subskribita devas esti sendita en la papera formo. Rigardu regularon <https://espero.bialystok.pl/eo/literatura-konkurso-2018/>

Konkursa afiŝo



Johano Pachter,

Venu al Luminesk' 2018

Dum la tagoj 27-a decembro 2018 kaj 3-a januaro 2019 en Königswinter apud Bonn en Germanio okazos renkontiĝo Luminesk'.

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la kvaran fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon - lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj. Ĉi-foje ĝi okazos en Königswinter apud la konata rivero Rejno. Organizas: Andreas Diemel, Andreas Diemel, Bismarckstr. 168, 47057 Duisburg, Germanio.
retadreso: andreas.diemel@web.de



Kalendaro - 2018

18-23.04. 2018	Esperanta Printempo en Szczecin	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Szczecin. lobacz.k@onet.eu
19-24.05. 2018	3-a Interkultura Majrendevuo Wroclaw – Góra kaj Sesa Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Wroclaw	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado en Wroclaw, informado.eo@gmail.com
19-25.05. 2018	70-a IFEF Kongreso en Wroclaw	Internacia Fervojojista Esperanto-Federacio Silezia Esperanto-Asocio https://ifef.wroclavo.damj.es/
26-28.05. 2018	37-a Pola Esperanto-Kongreso en Zabrze	Estraro de Pola Esperanto-Asocio estraro@esperanto.pl
1-3.06 2018	31-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo en Kulturcentro Podgórze (Centrum Kultury Podgórze), str. Sokolska 13 en Krakovo, http://www.ckpodgorza.pl	Krakova Societo Esperanto kse.krakovo@gmail.com http://www.kse.cba.pl/aligxilo/
9.06. 2018	Esperanto-stando dum 22-a Scienca Pikniko en Varsovio ĉe Nacia Stadiono „PGE Narodowy”	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alvamo@wp.pl
17.06. 2018	Montara Renkonto sur Ĉantorio la Granda en Beskidy Montaro	suchanekj@seznam.cz
12-23.06. 2018	40-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Gliwice stanislaw.mandrak@gmail.com
2-4.08. 2017	Esperanta stando dum PolAndRock Festival - en Kostrzyn ĉe la rivero Odra. Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo	Centro de Interkultura Edukado Halina Komar halinakomar@gmail.com
1-9.09. 2018	51-a Internacia Esperanta Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
7-9.09. 2018	Esperanto sur la Strando - 2018 Gdynia – Sopot. Temo: „Nia m/s „Zamenhof”	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/ FB – esperantowsopocie.pl
10.2018	42-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl

21-23.09. 2018	34-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2018” en Poznań	E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. http://www.arkones.org/eo/
16-18.11 2018 (?)	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 22 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
14-16.12. 2018	19-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanto-Societo pwierzbowski@gmail.pl
28.12-4.01 2019	10-a JES Junulara Esperanta Semajno en Hirŝluĥ (Storkow-Mark) apud Berlino.	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl , http://jes.pej.pl/2016/

Oni eldonis

Represo de „Sinjoro Tadeo”

En la 2018-a jaro ni festas la centan datrevenon de la unua Esperanto-eldono de "Pan Tadeusz" („Sinjoro Tadeo”) en la traduko de Antoni Grabowski. Dum 100 jaroj ĉi tiu libro estis publikigita kvar foje. La tria eldono en tre granda nombro aperis dum la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en 1987. Kvaran eldonon tre bone preparitan (kolora malmola kovrilo, tre bona papero) oni printis antaŭ du jaroj en malgranda kvanto de 100 kopioj, kiu plejparte estis senditaj al UEA kaj ĝi estis preskaŭ neaĉetebla por polaj esperantistoj.

Nun ekzistas la ebleco denove presi la kvaran eldonon. Pola Esperanto-Asocio efektivas ĉi tiun taskon. Represi novajn 100 kopiojn eblas per la **sistemo de antaŭpago**. La prezo de la libro kun landa sendokosto estas 30 zlotoj. Bonvolu plusendi la monon por la dezirata nombro de kopioj de "Pan Tadeusz" al speciala banko-konto de Pola Esperanto-Asocio kun noto "Pan Tadeusz". Post kolektado de la mono, PEA sendos ĝin al la presejo kun la ordo por presi librojn.

Je numero de bankokonto PEA: 15 2130 0004 2001 0558 6110 0010
Volkswagen Bank ul. Gen. W. Andersa 37, 00-001 Varsovio

En nomo de la Ĉefa Estraro de PEA la sekretario Robert Kamiński

Nia fotogalerio



16-18.03.2018 - Stando de PEA en Lodzo dum Turisma Forio “Ĉe limoj de kulturoj”



Koncerto de gefratoj Kolpanowicz dum Esperantaj Tagoj de Krakovo



Gaja vespero en picejo post fino de sabata programo en krakova kulturdomo



NIA FOTOGALERIO



En filharmonio en Szczecin. Por ke ĉiuj muzikamantoj sciu ke ni estas esperantistoj



Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj de 31-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo